

Pri la artikolo
Stalinismo en Esperanto-movado?
de Tyburcjusz TYBLEWSKI

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 1990-004-B-3, 1990.02.15

Cl.- Parolas Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

Okazas ŝanĝoj de mentaleco ne nur en la eks-komunismaj landoj, kie ĉiuj kuraĝas skribi vidpunktojn kritikajn pri la aŭtoritatoj, sed ankaŭ en la esperanto-movado en Okcidento. Multaj ekkomprenas, ke la neŭtralismo, kiu kondukis organizaĵon kiel Universala Esperanto-Asocio akcepti senkritike polican puĉon, kiu en Pollando renverŝis la gvidantaron de la esperanto-movado kelkajn monatojn antaŭ la jubilea Universala Kongreso Varsovia, estis eraro.

A.- Tyburcjusz TYBLEWSKI, tiam redaktoro de Pola Esperantisto, estis unu el la viktimoj de la menciita puĉo. Ankaŭ profesie, jam antaŭe, pro policaĵ kaŭzoj, li devis forlasi sian instruadon universitatan. Okaze de liaj restadoj en La Chaux-de-Fonds ni povis konstati, kiom profunde li suferis pro ĉio tio. Granda parto de lia sufero estis la silento, kiu regis en la okcidenta esperanto-movado rilate al la persekutoj kontraŭ la esperantistoj fare de la komunismaj reĝimoj.

Cl.- Nun li povas laŭte diri sian vidpunkton, kiel multaj aliaj suferintoj, kaj la esperanto-gazetaro komencas malfermiĝi al tiuj raportoj kaj kritikoj, eĉ se ili sin turnas kontraŭ la esperanto-aŭtoritatoj. Povu naskiĝi pli adekvata koncepto de la neŭtralismo en la esperanto-movado. Rilate al atencoj kontraŭ la homaj rajtoj devus ekzisti nenia neŭtraleco.

A.- Ni nun citos erojn el artikolo de Tyburcjusz TYBLEWSKI aperinta en la revuo MONATO en oktobro 1989-a. En tiu teksto Tyburcjusz TYBLEWSKI skribas rekte, sentime sian penson, dum en multaj aliaj artikoloj aperintaj en diversaj revuoj dum la komunisma regado, li devis nebuligi siajn dirojn. Aliaj orienteŭropanoj donis al ni la saman impreson, ke ili esprimas sin neprecize. Kaj nun, ni konstatas, ke ankaŭ precizaj ili povas esti. La timo je persekutoj devigis ilin duonkaŝi sian penson.

Cl.- Tyburcjusz TYBLEWSKI komencas sian artikolon per tiuj vortoj: "Nu, finfine ni ĝisvivis la tempon, kiam eblas nomi la nomeblan. Ke en centra kaj orienta Eŭropo dum jardekoj regis stalinismo, kiu ŝtopadis buŝojn, tion sciis ĉiuj. Kiam oni levis la politikajn kluzojn, ekfluis informtorentoj pri krimoj de genocido, kiuj sisteme okazadis sub la ruĝa stelo. Monaton post monato la mesaĝoj aktualiĝas kaj laŭ Roj MJEDVJEDJEV (la moskva historiisto-verkisto) estis proksimume 40 milionoj da diversaj viktimoj en Sovetio mem. Ni aldonu al tio viktimojn en aliaj - satelitaj - ŝtatoj kaj kreiĝos nombro egala kun populacio de granda nacio.

A.- Tyburcjusz TYBLEWSKI daŭrigas dirante: "En ĉio-ĉi io karakteriza kaj krime tipa estas, ke inter la viktimoj la plejparto devenis ne el la batalantaj malamikoj de komunismo, sed el absolute pacamaj normalaj homoj, kies "kulpon" pruvadis denuncantoj kaj barbaraj "popoljuĝistoj". Ili havis ordonon severe puni la "malamikojn de popolo" kaj ili faris "honeste" sian taskon, verdiktante de 10 jaroj en koncentrejo ĝis mortpuno. Rezulte de tiu sistemo oni kontraŭbatalis kaj krule punadis milionojn da tute senkulpaj homoj.

Cl.- Kiucele? - demandas Tyburcjusz TYBLEWSKI. Kaj li respondas: Pro la doktrino pri klasbatalo. Kiaefike? Barbare memdetrue. Tiuj homoj, kiuj malgraŭ universalaj angoroj provis atentigi, ke tiel ne decas, ke tio minacas al la socia ordo kaj ekzisto, tiuj homoj rapide estiĝis novaj viktimoj, denuncataj fare de la plej proksimaj "fideluloj".

A.- En absolute ĉiuj vivosferoj - de infanvartado tra sciencaj esploroj ĝis juĝista funkciado, ĉio, kio subiĝis al la sistemo, devis funkcii laŭ la samaj senmoralaj principoj, laŭ kiuj pri bono kaj malbono ne decidis la respektataj valoroj, sed la "rajtigita" funkciulo.

Cl.- En tia socia fono ankaŭ apartaj Esperanto-movadoj ekhavis tiajn kvalitojn. Parton de tio konfirmas **Ulrich LINS** en sia **La danĝera lingvo**, sed nur parton, pri kiu li havis dokumentojn. Pri la plejparto de eventoj neniam estis dokumentoj. Ili okazadis per senskribaj ordonoj aŭ en "spontana" kunagado de tiuj, kiuj "kredis" fari bonon.

A.- Blindiĝintaj germanaj esperantistoj pretis kunlabori kun hitleranoj, por "savi" la movadon. Blindsurdiĝintaj aktivuloj akceptis la taskon "tutmondigi" la feliĉpromesan ideologion. Kaj - je dio - kun sukceso ! En la landaj organizaĵoj aperis "eternaj" aktivuloj, kiuj obstinege kontraŭbatalis iun ajn liberecan tendencon...

Cl.- "Se ie en la landa Esperanto-movado aperis sendependa aktivulo... kaj scianta, kion fari, oni "pace" kaj "harmonie" uzis rimedojn, por elimini aŭ silentigi lin aŭ ŝin. Tiu regulo estis kaj estas absolute universala.

A.- Tyburcjusz TYBLEWSKI donas ekzemplojn kaj ankaŭ mencias la iom-post-ioman subiĝadon de UEA al tiu sistemo. La vero ĉiam venkas, eĉ se ĝi ne estas tre plaĉa.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andree GACOND diras al vi: Ĝis reaŭdo!